

Christian Morgenstern,

La suspiro

tradukita de Manfredo Ratislavo

Suspiro glitkuris sur nokta glaci'
kaj songis pri amo kaj ĝojo.
Kaj brilis neĝblanke, dum glitis ĝi,
la domoj jen apud la vojo.

Sed kiam ĝi pensis pri kara knabin',
ekardis kaj sinkis ĝi tiam -
tra l' fandiĝanta glacio – kaj ĝin ²
neniu ekvidis plu iam.

*Traduko de la Germana poemo "Der Seufzer" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1985-02.*

Arg-77-151 (2004-01-28 19:06:09)

²aŭ: tra la fandiĝanta glacio - kaj ĝin